

# LEA/G - INFORMILO

(MAGAZINO)

Organ des Freien Esperanto-Bundes in deutschsprachigen Gebieten  
Libera (Laborista) Esperanto-Asocio en germanlingvaj regionoj

Fondita (gegründet) 1956

Eldono nro.4

Novembro/decembro 2003



Hej! Ĉu vi jam ĝiris vian jarkotizon 2003 al la LEA/G-kaso?  
Se jes LEA/G ricevis 8 € eble pli. Elkoran kaj amikan dankon!  
Sen monetoj LEA/G ne plu povas varbi por nia Internacia Lingvo  
Esperanto kaj por la laborista movado.

Se ne vi certe ne volas riski vian membrecon. Do, bv. ĝiri la kotizon al  
Jiri Proskovec, Dortmund,  
Konto 4907 260 00 Norisbank Dortmund (BLZ 760 260 00)

Dankon!

Same la membro-kotizo por 2004 sumiĝos pri 8 €. Donacojn la asocio  
ĉiam bonvenigas!

Nura abono de la Informilo 10 € jare.

## Klara pledo por Esperanto en la Eŭropa Parlamento

Dum la jaŭda seanco, la 4an de septembro, pri la plilargiĝo de la Eŭropa Unio kaj ties kultura diverseco kun speciala fokuso pri regionoj kaj lingvoj de malplimulto, la itala M. Cappato (Kapato), kiu estas radikala deputito (*ne apartenanta al iu tradicia parlamenta grupo*) emfaze pledis por Esperanto en Eŭropa Parlamento.

## Internacia Esperanto-Muzeo translokiĝos

Spite gazetajn raportojn pri la malo, la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno fartas bone kaj kreskas. Ĉiujare la muzeo plenumas informpetojn de ĉa. 2000 personoj el la tuta mondo. Jam ĉiuj libroj de l'muzeo estas enkomputiligitaj kaj trovebla en la datbanko *Trovanto*. Nun oni enkomputiligas la gazetojn. Post kelkaj jaroj la muzeo ankaŭ ricevos novan oportunan ejon. (*Ankaŭ gazetoj, organoj kaj informiloj de LEA/G estas arkivataj en la muzeo!*)

S A T celas per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la libereco de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

(Ekstrakto el la statuto de S A T)

Das Statut ist mit Genehmigung der SAT-Zentrale Paris ins Deutsche übersetzt worden. Interessenten wenden sich bitte an: A.F. Stephan, Renchener Str.47, 77704 Oberkirch (Baden)  
Versandkosten 1,- € = Briefmarke, bitte der Bestellung beifügen. Danke!

✉ Ĉu vi havas interreton? Kiam vi trovas tekstojn pri Esperanto bv. sendi kopion al la redakcio. Dankon!

**Eldonanto – Herausgeber**

Libera (Laborista) Esperanto-Asocio  
en germanlingvaj regionoj (LEA/G)

Freier Esperanto-Bund

in deutschsprachigen Gebieten

Sekretario: Jiri PROSKOVEC

Heimbastr.10, (DE) 44143 Dortmund

Tel: 0231/551211

ePost: [proskovec@yahoo.de](mailto:proskovec@yahoo.de)

LEA/G-Konto: PROSKOVEC, Jiri

Nro.4907 260 00

Norisbank Dortmund (BLZ 760 260 00)

Redakcio LEA/G-Infomilo

Renchener Str.47 (DE)77704 Oberkirch

Resp. A.F.STEPHAN

Kunlaboras: K.H.KERSTING, Essen

Redaktas la interretan **MAGAZINO-n**

Gary MICKLE, Brüsseler Str.6

(DE)13353 Berlin

Retadrs.: [GMICKLE@NEXGO.DE](mailto:GMICKLE@NEXGO.DE)

LEA/G-Infomilo aperas du – ĝis kvarfoje jare

Abono : donace 10 €

Membreco/Mitgliedschaft en LEA/G :

8 € jare (inkluzivas liveradon/Lieferung  
de la infomilo kaj aliaj servoj/and.Dienste

Ligata: ASLE – Aŭstria Socialista Ligo

Esperantista, Vieno (Wien)

Organo: LA SOCIALISTO

(aperas en la infomilo de LEA/G)

Pri la enhavo de sia teksto respondacas  
la ensendanto mem. La redakcio rajtas,  
mallongigi tekstojn kiam mankas spaco,  
aŭ ne akcepti ilin.

**LIBRO-SERVO**

Dro. Wolfgang SCHWANZER

Pfarrer-Seeger-Str.9 (DE)55129 Mainz

*ŝparlibro kaj ĝi permesis la pagon  
de la kostoj.*

*Novaj aranĝoj postulas novan pri-  
laboron ekz. skribas la maŝino  
anstataŭ k,K – c,C, ĉar ĝi ŝajne opi-  
nias, ke nia lingvo estus itala.  
Povas ja esti, ke tion la PC-  
reparisto enflustris je mia komputilo,  
ĉar mi liveris al li ekzemplon de mia  
laboro por Esperanto esperante, ke  
per ĝi varbado estus ebla – ne  
rezulto!*

*Mi do petas vin, karaj, pardoni erar-  
ojn, kiuj en la tekstoj ie aperas  
kvankam mi tralegis ilin. Kiam vi  
trovos erarojn ne hezitu 'bati sur la  
arbuston' ĉe mi. Dankon !*

*Via Redaktanto*



*'Terura komputilo !'*

**Patkuko kaŭzis akcidenton**

Oni povas sperti akcidenton kiam uzante aŭtomobilon, kraŝi flugante al feria loko, suferi malfeliĉon en la mastrumado.

La plej multaj akcidentoj okazas en la kuirejo, asekuraj kompanioj asertas per statistikoj. Juna geedza paro spertis tion lasttempe. Ĉiun paron povas trafi tia malfacilaĵo kiam ŝatas manĝi patkukon.

La edzo kuiris patkukon per tipika vira metodo: Varmegan paton en la dekstra mano, leĝere preta la patkukon transporti per aer-salto al la alia flanko. La partnerino feliĉa, ĉar li transprenis iom de la matrumado, genuis apud li kaj esprimis sian dankon per agrabla plezurigo.

La patkuko flugis en la aero, ne 'surteriĝis' bedaŭrinde en la paton, sed kune kun la variega butero sur la kapon de la edzino. La doloroj kaŭzis, ke ŝi perdis la kontrolon pri sia aktiveco kaj enmordis la gambon de la kuirinto. Li kriegis pro forta doloro kaj batis la paton sur ŝian kapon.

En la malsanulejo la doktoroj konstatis ke tie estas cerboskuo kaj brogvundo je la virina kapo, ĉe li mordvundon en la femuro proksime de certa vira parto.

Difektojn fine ne restis. La venontan patkukon bakos la edzino.

*(Leginte en lokala gazeto.)*

**El la redaktejo...****Karaj gelegantoj,**

*de tempo al tempo nin trafas malfacilaĵoj. Oberkirch estas urbeto tamen tre aminda enmeze de montoj kaj montetoj en la Nigra Arbaro, nombras pli ol 20.000 enloĝantoj, do, estos estonte Große Kreisstadt, la urbestro tiam estos Oberbürgermeister – (oha! La CDU ĝojos) Oberkirch havas propran Stadtwerke kaj povas influ i.a. la konsumadon de la elektro: Elektradon redukti, eble neatendite plenplene liveri. Tio povas kaŭzi kurentimpulson kaj eble pro tio (aŭ fulmotondro?) mia komputilo rifuzis la kontinuan de la laboro. Mi devis zorgi, ke la aparato estas reparata, la presilo devis esti komplet' nova. Mi faris 'ekprenon' en mia >>>>>*

**Stelo de nia espero**

Ĉie sur nia tero  
nur malpaco sen fin'  
kun ĉagrena sufero.  
Stelo de nia espero  
helpu forigi ĝin.

Via radia beno  
turnu la nubojn for.  
Signo de l' homa  
kompreno,  
pacon de stela sereno  
donu de koro al kor'.

Iĝu la vera revo,  
ke oni sekvu vin,  
ĉie sur nia tero.  
Stelo de nia espero,  
lumoj kaj gvidu nin.

Karl Vanselow

**Esperanto-Muzik-Magazino**

Juna teamo en Francio eldonas  
**ROK – GAZET'**

Ekskluziv' formata broŝuro, DIN A 4,

kolora titolpaĝo, tre interesaj tekstoj kaj fotoj, desegnaĵoj, skizoj k.m.p.a.

44 paĝoj, publikigo de anoncetoj ebla. Ĉefredaktisto : Tony Guyot

Bv.mendi provnumeron ĉe Rok' Gazet' Administrejo FR-31450

Donneville, Tel: +33 561 81 95 65

Faks': +33 534 66 04 15

Retadr.: [Vinilkosmo@esperanto.org](mailto:Vinilkosmo@esperanto.org)

[euorkka@club-internet.fr](mailto:euorkka@club-internet.fr)

TTT-ejo <http://www.rokgazet.free.fr>

[www.vinilkosmo.com](http://www.vinilkosmo.com)

**Provnumero kostas 5,35€**

**(= 7 IRK)**

Abono validas por 3 numeroj ne por unu jaro. Prezo 16€ (21 IRK)



## Misokazaĵo

En mia lando Bulgario estas kutimo de l'popolo, ke sur la ĉapeleto de ĵus naskita bebo estu metita eta ormonero fiksita per ruĝa fadeno. Laŭ superstico tio garantias sanon kaj, precipe, preventas la bebon antaŭ malbon-efika rigardo.

En Bulgario la registaro kaj la ŝtata banko ofte faras monan reformon. Dum moninterŝanĝo mia ofico estis kontroli ĉi tiun fariĝon en la regiono. Je unu tago, kiam mi vizitis la vilaĝan administrajn mi trovis junan belulinon, kiu gaje montris al atendantoj ĵus ricevitaĵojn, ŝajne orajn, belegajn monerojn. Ĉiuj rigardis ilin per intereso. Certe ne nur al mi venis la opinio, ke ora monero bone taŭgas por ornamo novnaskitan bebon. Ĉu la belulino eble naskis bebon?

Mi diris al ŝi: "Reale oni metas la oran monon per ruĝa fadeno sur ĉapeleto de la bebo; kontraŭ malefikaj rigardoj – ĉu ne."

Ŝi tuj ekrigardis min kaj diris ĉagrenite: "Kial vi, sinjoro, vizitis nian urbon? Ĉu por ofendi min? La homoj en nia vilaĝo jam kompatis min. Vian ofendon mi ne bezonas."

Mi ne komprenis ŝin, mia rigardo estis demandanta. Eble pro tio ŝi daŭrigis parolon kaj klarigis, ke ŝi dum tago kaj nokto lamentas, ĉar ŝi pro malsano perdis la bebon antaŭ la naskiĝo. Nun ŝi ne plu kapablos porti bebon en tiun mondon.

"Vi nun certe komprenas, vi senkora homo!"

Konfuzite mi pardonpetis, sed la junulino ploris kaj eliris la ejon. Mi petis la vilaĝestron senkulpi min ĉe la virino.

Eĉ ankoraŭ hodiaŭ, kiam mi vidas en parko, sur strato, patrinon, kiu tiras aŭ puŝas beb-ĉareton, mi jetas rigardon al la beba ĉapeleto por konstati, ĉu tie estas ora monero fiksita per ruĝa fadeno.

Ivan Tr.Minčev

## "Maldekstra Forumo"

**Maldekstra Forumo** estas malgranda Esperanto-grupo en Berlino, unu el pluraj diversaj, kiuj kuniĝas en la *Esperanto-Ligo Berlin*. Kelkaj el ni estas samtempe membro de la *Sennacieca Asocio Tutmonda (S A T)*, kiu organizas maldestre orientatajn esperantistojn de diversaj tendencoj, respektive de la *Libera Esperanto-Asocio en germanlingvaj regionoj (LEA/G)*, kiu estas kontrakte ligita kun S A T. Esperanto laŭ nia koncepto estu pli ol nur la lingva komunikilo kaj komuna intereso de tutmonda klubo (kio ne signifas, ke ni malaprezas konkretajn aplikojn de la lingvo kiel konatiĝi kun homoj de vojaĝoj aŭ aranĝoj). Esperanto estas por ni kulturpolitika strebo je radikala kaj egalisma reformo de la internacia komunikado, kaj krom tio vivanta eksperimento kun cosmopolita aliro al la kulturo. Ni volas konatigi pli larĝan publikon per ĝi.

Nia grupo eldonas germanlingvajn flugfoliojn kaj broŝ-urojn. (Flugfolioj trad. Esperante haveblaj!)

Kontaktadreso per: Esperanto-Ligo Berlin, Falkstr.26,  
(DE) 12053 Berlin

(Mathias Peick k. Tomas Schild tradukis el la germana lingvo,  
por ke la **Ofte Starigitaj Demandoj** pri la  
Laborrondo de Gesocialdemokratoj en la interreto  
estos konataj en la mondovasta esperantistaro laborista!)

'Arbeitskreis Sozialdemokratinnen und Sozialdemokraten im Internet' estas la oficiala nomo de la unuiĝo de retaj partoprenantoj, kiuj apartenas al la SPD aŭ kun la partio simpatisanta kun ĝi. La laborrondo estas *Virtueller Ortsverein (VOV)* agnoskita de la SPD-estraro kaj fondita laŭ propono kun intensiva partopreno de la parlamentano Jörg Tauss de la SPD.

La laborrondo volas uzi la interretan medion por la politika laboro.

Kunvenas en la VOV gekameradoj, kiuj ĉi tiun labormanieron plu evoluigas en la partio kun ilia fradicia partilaboro, en la tuta mondo, kiuj volas kunlabori en la SPD, sed kiujn la tradiciaj manieroj de la politika voligo ne estas simpatisa, nemembroj de la SPD, kiuj povas identigi kun la celoj de la partio kaj de la VOV.

*La redakcio: La supra estu nur atentigo pri la ekzisto de la laborrondo. La tutan tekston filtris K.H.Kersting el la programoj kiun lia interreto prezentas. Ĝi konsistas el pli ol du paĝoj, volumo por kiu nia informilo ne havas sufiĉe da spaco. >> Kiu ne posedas interreton, tamen interesas pri la teksto povas havi ĝin kontraŭ afranko de 1 Euro ĉe: A.F.Stephan, Renchener Str.47, (DE) 77704 Oberkirch (Baden).*

## Informoj pri kursoj k. libroj

### Esperanto-Kurse im Internet

*Unser Kurs – für Autodidakten geeignet  
Korrespondenzkurs in Deutsch – von Steffen Pietsch  
(E-Mail)*

*Fernkurs des Deutschen Esperanto-Bundes  
Esperanto für Fortgeschrittene – von E.Grimley-Evans  
Internacia perfektiga koresponda kurso –  
Von Boris Koller (E-Mail)*

*Kvazaŭlernejo: Internationale Esperanto-Schule  
Von Tibor Sekel*

*>> Detaloj/Einzelheiten:*

*Berliner Esperanto-Bücherdienst Vera Tautorat  
Prenzlauer Allee 87, (DE)10405 Berlin*

*eMail: Vera.tautorat@gmx.de  
(kostenloser Katalog bestellbar)*

*(kaj)*

*Rolf Beau – Literaturo Servo 'Espero'  
Eißer Kirchweg 18, (DE)27333 Schweringer*

*eMail: RoBo.Espero@T-online.de*

Neil Kinnock, kiu respondecas en Eŭropaparlamento pri komisionaj interpretistoj kaj tradukistoj, akceptas diversajn lingvojn sed favoras la anglan kaj opinias, ke, kvankam estonte 25 ŝtatoj en la Europa-Unio, la konservacioj ne estu en Esperanto.

Hèctor Alòs i Font de la Kataluna Esperanto-Asocio, komentas la eldirojn: "Mi neniam ĉesas surprizi kiel homoj povas tiel mirinde kontraŭdiri sin kaj foje ne ŝajni komplete idiotaj."

## Winternacht

Verschneit liegt rings die ganze Welt,  
ich hab' nichts, was mich freuet,  
verlassen steht der Baum im Feld,  
hat längst sein Laub verstreuet.

Der Wind nur geht bei stiller Nacht  
und rüttelt an dem Baume,  
da rührt er seinen Wipfel sacht  
und redet wie im Träume.

Er träumt von künft'ger Frühlingszeit,  
von Grün und Quellenrauschen,  
wo er im neuen Blütenkleid  
zu Gottes Lob wird rauschen.

(Josef Freiherr von Eichendorf  
1788 – 1857)

\*\*\*

*Tio estu dirata!*

### Homoj pli kaj pli aĝas

En Germanio juna ano de la kristana partio opinias, ke homoj en aĝo 85 kaj pli ne bezonus anstataŭaĵon de sia koksa artikolo; la asekuroj ŝparus monon, plialtigon de la kotizoj al la malsankasoj estus evititaj.

Politikistoj *de ĉiu koloro* akuzas la aĝulojn pro la plimultigo de la pensiaj elpagoj, ĉar ili pli kaj pli aĝos.

Kristdemokrata Parlamentano en Germanio certigis antaŭ ses jaroj:

"Niaj pensioj estas sekuraj!"

Ni *etaj* pensiuloj demandas: "Kaj niaj?"

Sekuraj estas la *pensioj* de manaĝeroj, kiam ili ricevas kompensaĵoj post vendo de la entrepreno aŭ rezigno pri la posteno. Milionojn! La kontrolkonsilio konsente kapoklinas (*ĉar la membroj de tia komisio certe ne bezonas rezigni pri salajregoj.*)

*Cetere: Kiam mi estis membro de la sindikato Komerco-Banko-Asekuroj kaj en la estraro en Düsseldorf ni libervolaj estraranoj kontraŭis la amasigon de kontrolkonsilaj postenoj de sindikat-oficiuloj.*

Oni rekomendas pere de komisionoj, ĉiujn elspezojn ekz. por pensioj redukti per 10%. Bedaŭrinde oni ne mencias la kompensaĵojn por parlamentanoj.

La pensio estas asekuro – ĉu ne? – do, oni devas elpigi pensiojn (*aŭ ĉu la registaroj tiun monon jam elspezis por partopreni al la financadoj de militoj?*)

Karaj gelegantoj, la redakcio ĝojos pri ĉiu kontribuo por tiu ĉi rubriko – *Tio estu dirata*

## Vintra nokto

Sub neĝo kuŝas ĉio ĉi  
ĝojigas min nenio.  
Jen arb', sur kampo staras ĝi  
sen iu ajn folio.

Blovadas nur la vento jen,  
la arbon skuete, tute,  
sin movas tiu kvazaŭ en  
la sonĝo parolante.

Ĝi sonĝas pri printemp' kaj pri  
verdaj' kaj fonto-plaŭdo,  
susuros tiam ree ĝi  
por Di' kaj ties laŭdo.

(Esperantigis Manfredo Ratislavo dum la nokto  
de l' 22. – 23. Februaro 2003)

\*\*\*

## La kvara potenco

Dum mia militkaptiteco en Egiptio mi elektis la t.n. Antifa-wing (...-kampejon) por ne plu esti inter militkaptitoj, kiuj ne ĉesis la fidon pri la faŝista ideo. En tiu kampejo oni povis partopreni en edukantaj kursoj pri demokratio k.a. Mi lernis, ke demokratio nur tiam estas sekurata, kiam la tri potencoj (en Germanio ekz.) *parlamento, federacia konsilo, registaro* taŭge funkcias. Kaj: Oni instruis, ke la plej maljuna demokratio estas en Britio.

Sed, la profesoro klarigis, en demokratio ne manku la *kvara potenco, la libera Ĵurnalistiko!* Ĝi estas la konscienco de la demokratio.

Ekzistas ĵurnalismo kiu dependas de iu ajn kapitaldonanto, entrepreno, kapitalista interesulo ktp. Tial mi zorge pritaksas, kiun ĵurnalon, gazeton, mi legas kaj al kiu mi povas fidi. Ek de la kvindekaj jaroj mi ŝatas la magazinon *DER SPIEGEL*.

Albert Stephan

## Reĝustigo

En INFORMILO nro.3 aperis anekdoto de nia leganto kaj kamarado Gilbert Lebec. Pro materia kialo ĉi tiu anekdoto: KIAM LA LOKOMOTIVO FAJFIS... fariĝis nekomprenebla. La aŭtoro agnoskas, ke li kulpas pri tio. Sed ne estas dubo pri lia ĝusta interpretado de la fizika okazaĵo. Li pretas reverki ĝin por estonta nova aperigo en la Informilo.

*Kara Gilbert, ni pretendas la rajton mallongigi tekstojn je kio povas okazi, ke la kompreno fiaskas. Ĵus tio estiĝis pri via anekdoto. Bv. pardonu! La Redakcio*

# La Socialisto

## In eigener Sache

Seit Jahrzehnten bemühen sich die österreichischen Organisationen der Arbeiter-Esperanto-Bewegung darum, die Internationale Sprache Esperanto für die Zwecke der Arbeiterschaft einzusetzen. Vor dem zweiten (2.) Weltkrieg arbeitete die ALLE (Aŭstria Laborista Ligo Esperantista, Österreichischer Bund der Arbeiter-Esperantisten) für dieses Ziel. Diese Organisation wurde von der austrofaschistischen Diktatur unter Dollfuss und Schuschnigg aufgelöst, die Genossen oftmals ins Gefängnis oder Anhaltelager geworfen. Die darauf folgende Hitler-Diktatur verschärfte noch die Lage der Arbeiter-Esperantisten.

Nach dem Ende des Krieges wurde von den unter Hungersnöten und Bombenzerstörung leidenden Genossen die ASLE (Aŭstria Socialista Ligo Esperantista, Österreichischer Bund Sozialistischer Esperantisten) gegründet. Diese führte die Arbeiter-Esperanto-Bewegung in Österreich zu neuer Blüte, so lange, bis die Mutterpartei SPÖ (Sozialdemokratische Partei Österreich) beschloss, nicht länger auf Esperanto als Mittel internationaler Verständigung zu setzen.

Das bedeutete zwar nicht das Ende der Anstrengungen der Genossen, die Ziele, denen sie sich verpflichtet fühlen, weiter anzustreben. Es bedeutet aber sehr wohl einen zunehmenden finanziellen Engpass, der mittlerweile ein Ausmaß erreicht hat, der den Fortbestand der Organisation ernstlich gefährdet.

Organisationen, die uns bisher unterstützten, sehen sich aus Gründen der allgemeinen *Sparsamkeit* außerstande, diese Hilfe fortzusetzen.

Aus diesem Grunde sehe ich mich als Kassier der ASLE genötigt, an Sie, liebe Genossinnen und Genossen, zu appellieren, die ASLE nicht nur durch Zahlung der Mitgliedsbeiträge, sondern auch durch Spenden zu unterstützen.



Solidareco

Bitte, richten Sie Ihre Spende an das  
PSK-Konto 2 412 263  
Bund Sozialistischer Esperantisten  
Kennwort: **SPENDE**

Wir danken Ihnen im Vorhinein für Ihre Großzügigkeit.  
Österreichischer Bund Sozialistischer Esperantisten

Wien, im Oktober 2003

Reinhold Kammler

Kassier

*La Socialisto* wird gemeinschaftlich mit dem Informationsdienst des Freien Arbeiter-Esperanto-Bundes in deutschsprachigen Gebieten, Sitz Dortmund, herausgegeben.

*Per la supra artikolo informas ASLE pri la jardekaj klopodoj antaŭ la lasta milito, Esperanton enkonduki por la celoj de la laboristaro. Siatempe laboristoj esperantistaj fondis ALLE (Aŭstria Laborista Ligo Esperantista), kiu estis malpermesita sub la diktaturo de Dollfuss kaj Schuschnigg. Okaze tio ofte kamaradoj estis enkarcerigitaj. Sekvis la Nazi-diktaturo, kiu pliseverigis la situacion.*

*Post la milito estis fondata ASLE, asocio de socialistaj esperantistoj, kiun dum longa tempo la Aŭstria Socialdemokrata Partio (SPÖ) finance subtenis. Pro ĝenerale bezonata ŝparemo SPÖ ne plu povas daŭrigi la subtenon.*

*(Por la komentario resp. Stephan)*

## Karapaco.de

Sur la strato renkontiĝis du maljunaj amikoj kaj post la kutima bonvenigo demandis la unua, kien la amiko intencas iri.


'Mi vizitos la Interret-Kafejon. Ĉu vi ne ŝatas kuniri? Tie mi montros ion al vi.'

En la kafejo ili kune trovis liberan lokon antaŭ komputilo. Servistino alportis menditan kafon. La spertulo de ili uzis la sklavaron por skribi: [www.sat-esperanto.org](http://www.sat-esperanto.org).

Post kelkaj sekundoj aperis sur la ekrano de la monitoro la t.n. hejmpaĝo de nia asocio en Parizo. Sub la rubriko *Novajoj* ili legis: Nova Ligo al *La Mortula Ŝipo* (Verko de B.Traven, socia satiro kun certa amara humoro. Traduko de Hans-Georg Kaiser).

La du fariĝis scivolemaj kaj direktis la sagon per la komputila muso al la vortoj *La Mortula Ŝipo*, klakis sur la muso-butono. Post denove kelkaj sekundoj sur la ekrano aperis bildo de la Esperantoklubo KARAPACO en Altenburg.

Komence oni opinias ke *karapaco* signifas *Lieber Frieden*, sed ili lernis post konsulto de Esperanto-vortaro – estas uzebla i.a. *PIV Plena Ilustrita Vortaro de S A T* – ke la vorto estas la traduko de la germana *Panzer (Zool), Rückenschild*.



La indiko *La Mortula Ŝipo* staras ankaŭ en parto sur la karapaco. Klakante la vortojn oni povas legi la verkon de Traven!

Cetere: Altenburg estas urbeto 30 KM sude de Leipzig, en Germanio konata kiel la urbo de la kartludo *SKAT*.  
(Kersting)

*El la SATEB-organo >La Verda Profeto< 422 aŭg.03*  
Vortoj de Zamenhof pri laboristoj

'...eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertos la utilon de Esperanto, sed ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencon kaj ideon de la esperantismo.

(traduko) *'...vielleicht für niemanden in der Welt hat unsere demokratische Sprache solch eine Wichtigkeit wie für den Arbeiter. Ich hoffe, dass mehr oder weniger früh die Arbeiterschaft unsere Sache unterstützen wird. Die Arbeiter werden nicht nur die Nützlichkeit des Esperanto erfahren, sondern auch mehr als alle anderen das Wesen und die Idee des Esperantismus erkennen.'*

**AFORISMO:** Ankaŭ oficistoj ĉu laborantaj por privataj entreprenoj ĉu por la ŝtato estas laboristoj. Mem manaĝeroj, direktoroj kaj aliaj direktantaj personoj laboras, sed ofte parte en la propra poŝo. Manaĝeroj devas i.a. pripensi, kiamaniere malaltigi la kostojn (*kaj konzervi ilian salajron!*) Simpla metodo: maldungi laboristojn, kiuj ja ricevas subtenon el la asekuro por senlaboruloj en kiu ili enpagis. Sed: la ŝtato uzas la monon en tiu kaso por ŝtattaskoj kiel eble konstrui aleon ie, kiun poste neniu bezonas.

Do, la ŝtato devas subteni la solidar-kason, fakte repagi la prenitajn monon, el impostoj, sed en la

impostkaso mankas certan monon, ĉar nur laboristoj, oficistoj, pagas regule imposton. Por la aliaj i.a. grandaj entreprenoj ekzistas t.n. *kaŝanguloj* en la impostleĝo, kiu permesas redukti elspezojn por la imposto aŭ, riĉuloj 'parkas' enspezojn impostlibere en eksterlandoj ekz. en Luksemburgo. Laboristoj ne povas 'parki' monon ie, ĉar ili bezonas la tutajn enspezojn por la vivo. Kion fari, kiam la ŝtataj kasoj estas vivantaj en mizero? Denove tutsimple, altigi la pagojn por la kaso de senlaboro, por solidaro. Samtempe malaltigi la imposton, do, ankaŭ malriĉaj laboristoj profitos, sed ne tiel multe kiel riĉuloj, ĉar tiuj ja pagas pli altan imposton. (*10% impostŝparajo de 1500 € salajro = 150 €, 10% de 15000 € = 1.500 € - ĉu ne?*) La 150 € la laboristo bezonas por pagi la pli altan solidarelspezojn k.a. pli altajn prezojn. La riĉulo pagas kotizojn al libere elektitaj asekuroj, kiuj eble ne altigis la prezojn. Se jes la altigo ne estas nominda. Do, la bonstathavanto profitas eble eĉ 1.500 € kaj povas kompreneble malfacile pagi iujn altajn prezojn.

Fino de mia lamentado, mi estas rentulo kaj ne plu pagas en iun solidarkason. Tamen atendas tiel nomatan *Nulrondo* en 2004. Nu, ja, mi kontribuos por la ŝtata kaso por ke ĝi povus konstrui ne necesan aleon!

Stephan

*PS Kiu de vi, karaj legantoj, ne estas laŭ mia opinio, trovos eble erarojn, bv. skribi al mi. Mi ĝojos pri ĉiu alskribo, petas permeson publiki la leterenhavon en la venonta eldono de la informilo. Dankon!*

*Mia adreso: A.F. Stephan, Renchener Str.47  
77704 Oberkirch (Baden)*

(*Nia interret-respondiculo K.H.Kersting trovis en GANGOLO jenan tekston, kiu certe estas interesa por Esperanto-parolantaj humanistoj, al kiuj ja apartenas ankaŭ S.A.T.-membroj!*)

**Prezidanto de monda banko kritikis evoluintajn landojn** la t.n. riĉajn landojn pri iliaj tro altaj elspezoj en sindifendo kaj agrokulturaj subvencioj. "Nia planedo tute ne estas ekvilibrita", diris Volfenson dum ĉijara kunveno de Monda Banko kaj IMF (Internacia Monda Fonduso) okazanta en Dubajo (ĉefurbo de Arabaj Emirlandoj).

Prezidanto Volfenson menciis, ekzemple, ke la totalo de la mona helpo disdonita al la malriĉaj landoj atingas jare ĉaŭ. 56 miliardojn da usonaj dolaroj. Aliflanke la evoluintaj landoj elspezas proks. 600 miliardojn da US-dolaroj por militemaj intertraktadoj. Li ankaŭ ne forgesis denunci la 300 miliardojn, per kiujn la riĉaj landoj subvencias la proprajn agrokulturojn.

"Multaj regas tro multe kaj al tro multaj homoj mankas espero (*por vivo sen malsato en libereco! La red.*) Estas tro da tumultoj, da militoj, da suferoj", diris Volfenson, la prezidanto de la Monda Banko, tuŝante la kernon de la argumentaroj, kiu ja finfine malpermesis al evolu-landoj atingi minimuman kompromison kun la riĉaj landoj.

## NEKROLOGO

Mortis en aĝo de 75 jaroj nia fidela membro

**Inge Rodewig**

Kadre de la Esperanto-movado ŝi konatiĝis kun Hans, la edzo, jam kiel junaj homoj. – Inge multe engaĝiĝis en socialaj aferoj, okupiĝante dum la pasintaj 30 jaroj ĉefe kun gemaljunuloj.

Ni ne forgesos Inge.

Ni kondolencas al Hans kaj la familianoj.  
La Libera Esperanto-Asocio

## NEKROLOGO

Devis forlasi ĉitium mondon fidelaj geamikoj kaj membroj de LEA/G kaj ASLE:

Emilie PRUSCHKE, Luenen  
Otilie BÜRGER, Linz/Donau  
Karl VOLEK, Wien  
Rosa KOLLER, Wien  
Karl VAVRA, Weitra

Ni kondolencas al la familianoj.

## Balanciĝoj de l'vivado

En la doloro de la vivado  
mi plu nenion esperas, mi plu nenion atendas.

Ĉion mi havis, ĉio al mi foriris,  
sed mi estas contenta ĉar vi estas kun mi  
kaj la iluzioj de ni du sentitaj  
kun tiom da kormolo, kun iom da plezuro,  
ankoraŭ postrestas en mia idealismo  
kaj tie sekuras pro mia fidelec'.

Kun sekura paŝo mi iras laŭ la vojo  
apoge sur manoj de bonaj amikoj,  
kiuj glosas vian nomon kun tiom da emocio,  
ke de ili leĝeriĝas mia amara amdolor.  
Ekde la altejoj vi konservas mian riĝmon,  
ekde la altejoj vi konservas mian fidon,  
kaj mi cin konservas ene de mia animo,  
kaj mi cin konservas ene de mia esteco.  
Sur la tero mi daŭriĝas sub de cia rigardo  
nur ĝis kiam la vivado, en sekvo de sia kurso,  
min portos ĉe via flanko, per alia balanciĝo.

Ma. Luisa Menéndez

**SAT-anoj kutimiĝu al  
eksternacia sent-, pens-, kaj agadkapablo!**

Lanti

La 77-a Kongreso de  
Sennacieca Asocio Tutmonda  
okazos en  
urbo Bratislava (Slovakio)  
en Aŭgusto 2004

Detaloj kaj aliĝiloj havebla de la centro de S.A.T.  
67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris  
Tel. +33.1.47.97.87.05  
Telekopiilo +33.1.4797.71.90  
Retadreso: [satesper@noos.fr](mailto:satesper@noos.fr).  
TTT-paĝoj: <http://www.sat-esperanto.org>  
*Frua aliĝo ŝparas monon!*

## Esperanto – kurz gefaßt

(Daŭrigo)

Nach Verhältniswörtern gebraucht man stets den  
1. Fall, zur Bezeichnung der Richtung den 4. Fall.

per la tramo - mit der Strassenbahn  
mi iras en la ĉambro – ich gehe im Zimmer  
mi iras en la ĉambron – ich gehe in das Zimmer  
(hinein)

## Zahlwörter

Die Grundzahlen sind: unu – 1, du – 2, tri – 3, kvar – 4,  
kvin – 5, ses – 6, sep – 7, ok – 8, naŭ – 9, dek – 10,  
duk-unu – 11, dek-du – 12, ktp. dudek – 20, tridek – 30,  
kvardek – 40 ktp. cent – 100, okcent – 800,  
okcentnaŭdekdu – 892, mil – 1000, dumil – 2000,  
miliono – Million.  
Die Grundzahlen erhalten nie das –n de 4. Falles!

Zahlumstandswörter werden mit der Endung –e  
gebildet z.B. unue – erstens, trie – drittens usw.

Vervielfältigungszahlen werden mit der Silbe –ob/  
gebildet: duoble – zweifach, kvaroble – vierfach.

Bruchzahlen erhalten die Silbe –or: duona –  
halb...

Sammelzahlen die Silbe –op: triope – zu Dritt ...

(Daŭrigo eldono 5 en januaro/februaro 04)

**Esperantosprecher und die es werden  
wollen, besitzen außer einem Lehrbuch  
der Sprache ein  
WÖRTERBUCH!**

*LEA/G hat einen Bücherdienst, der alles, was die  
Internationale Sprache Esperanto bietet,  
liefert. Adresse: Dr. W. Schwanzler  
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz*

## Jubilea festo, 100jarojn Esperanto en Berlin 21a – 23a de novembre 2003-10-04

En novembro 1903 estis fondita la unua Esperanto-grupo en Berlin. Tradicie geesperantistoj el la hodiaŭaj federaciaj landoj Brandenburg kaj Berlin kunlaboras kaj –festas. Pro tio Esperanto-Ligo Berlin kaj la Brandenburgia Esperanto-Asocio komune aranĝas ĉiun jubileon.

Programmo kaj aliĝilo estas haveblaj ĉe:

Esperanto-Ligo Berlin  
p.adrs.Ina Taŭtorat  
Falkstr.26 (DE) 12053 Berlin

### S.A.T.E.B.

(Laborista Esperanto-Movado – Workers Esperanto-Movement)  
p.a. Sekretario : Anne Johnson, 42 Beresford Road, Islington  
London N5 2 HZ (Tel.020 7359 8 102)

SATEB Sennacieca Asocio en Britio celas diskonigi kaj instrui la internacian lingvon Esperanto kaj antaŭenigi la ideojn de S.A.T. al ĉiuj progresivaj organizoj. SATEB estas sendependa de S.A.T., sed aktive subtenas ĝin per disvastiĝo de informoj pri ĝiaj principoj kaj laboro; organizado de kunvenoj ĉiujaraj.

### TRENHA

(Asocio Tradicia Esperanto, p.a.Dro.André Albault,  
21, rue de Verfeil, FR-31200 Toulouse)

La asocio eldonas regule proponojn pri *pli taŭga alfabeto* ekz. j = y k.a. Ĝi prezentas ilin en informilo, i.a. en broŝuro : 104 paĝoj, DIN A 4, kolora plasta kovrilo, 12€ plus 1,20€ sendkosto, entute do 13,20€

Jen poemo de A.E.Kubulnieks skrib.per TRENHA-alfabeto :

### Rezisto-Forto

Sufiche trinkis el pokaio  
Mi amarecon de la viv',  
Do kio donas al mi l'forton  
Rezisti spite kay kun splin'?

Amikoy miay bone scias,  
Nomijas yene chi sekret':  
La verda lingvo Esperanto  
Kun Nova Helpa Alfabet'.

La sort' kondamnis min kruele  
Al senkonsola ermitec',  
Sed ridas mi kay plu ekzistas  
En Esperanto-interes'.

**Komputil-uzanto**, komencanto, kiu intencas skribi tekston en la lingvo Esperanto ofte ne scias kiamaniere tajpi literojn kun akcento: ĉ, ĝ, Ĥ ktp. aŭ tiuj literoj ne estas en la programmo. Kiun fari? Zamenhof-reguloj permesas tiam uzi la 'h', do, suficha anst. sufîĉa.

## KROME

Nia leganto kaj liveranto de poemoj, Manfred Retzlaff, ankaŭ konata sub la pseŭdonimo Manfredo Ratislavo, propagandas por Esperanto per leteroj al poemistoj, petante permeson publiki la poemon de ili en Esperanto-gazetoj. Ĝis nun Manfredo ne ricevis malakcepton.

### Esperantaĵoj haveblaj:

Esperanto – ein Ausweg aus Babylon ?

(Broŝuro pri 95 jaroj Esperanto en Düsseldorf, parte du-lingve, 205 paĝoj, fotoj, enhavas ankaŭ komunikojn pri LEA/G ĝenerale k. spec. en Düsseldorf, i.a. pri Bartelmes, kiu ja naskiĝis en tiu urbo, k. Pillekamp k.a. Ankoraŭ du ekz. liveblaj ktr. Pago de l'ekspedelspezoj – 1 € en poŝtm.)

**AMIKECA RETO** – broŝuro pri turismo inter ge-esperantistoj; sur 131 paĝoj nomoj, adresoj, viziteblecoj de/ĉe esperantistoj en la tuta mondo; 12 pĝ. Informoj. Havebla ĉe L'Amikeca Reto, 88 rue Victor Hugo, F-37 400 Amboise (aŭ) A.F.Stephan, Renchener Str.47 (DE) 77704 Oberkirch (Baden)  
Kostas 20 € plus ekspedelspezoj

**Bildpoŝtkartoj** – 8 buntaj ktj. pri Esperanto-okazaĵoj en iama tempo, en kolora kovrilo.  
4 € inkl. ekspedo

*Elkoran dankon por la financa subteno en 2003!*

Herta Bellen, Dortmund – 17 €  
Margot Weichmann, Dortmund – 42 €  
Friedel Bues, Hannover – 17 €  
Hans k.Inge Rodewig, Hannover – 4 €  
Max Hocke, München – 72 €  
K.E.Paech, München – 42 €  
Willi k.Margret Brandenburg, Telgte – 9 €  
Eberhard Brauser, Oranienbaum – 7 €  
Helga Conzeth, Medtman – 7 €  
Günther Doerr, St.Egidien – 2 €  
Willi Ehler, Berlin, donacis abonon al ĉeĥa kdo.  
Rainer Haupt, Hamburg – 2 €  
Wolfgang Schwanzler, Mainz – 2 €  
Lupiro – 42 €  
Raymond Raurich, Chaillac – 2 €  
Proskovec (sekretario)

### GRATULOJN

LEA/G intencis siatempe estonte gratuli membrojn, kiuj atingis tiel nomatan *rondan naskiĝtagon* ekz.20, 30 40, 50, 60, 70, 80, 90 eĉ 100 k.pli.

Ni ne forgesis tion, sed ni ne konas ĉiun naskiĝtagon. Do, bv. pardoni la senatentecon kaj akceptu malfrue niajn bondezirojn. LEA/G